# Mondcivitano

3-A ELDONO 1-A JARO JUL-SEP 2005

**SPECIALA ELDONO**



## Ĉefartikolo

BRRRRR!
Saluton al ĉiuj,

Ĉi-eldone ni iomete malvarmsentas kun niaj geamikoj kiuj estis en Porto Alegre - Suda Rio-Grando, okaze de la 40-a BKE. Tie *neforgeseblaj emocioj* plenigis la animon de la esperantistoj kaj vigligis la movadon pere de novaj ideoj kiuj estis interŝanĝitaj. Oni multe diskutis pri la Brazila kaj la Nordorienta Agado. La homoj ankaŭ profitis la okazon por koni kelkajn el la belaj urboj de Suda Rio-Grando, ekzemple Gramado kaj Porto Alegre. Tamen ni ne povas forgesi mencii ke kelkaj cearaanoj sukcesis vendi belajn hamakojn kaj t-ĉemizojn tie. Nu aŭ ili estas vere ege belaj aŭ la cearaanoj estas ege bonaj vendistoj. La venontan fojon ni pruvos tion alportigante banvestojn por vendi.

Jam Fortaleze, la cearaanoj ekrevas pri la 43-a BKE, kiu okazos en la cearaa ĉefurbo ekzemple de la UKE 2002. Ni ankaŭ feliĉas por la gastigado de niaj eksterlandanaj kaj eksterregionanaj geamikoj. Sanoza malfermigis Ĉinion al ni pere de ŝia vizito al CEA. Ni multe da informoj pri kulturo, politiko ktp interŝanĝis. Ni ankaŭ aŭdis Tarcísio-n Lima-n kantante regionaĵojn sed ĉi eldone ni memoras belan poemon verkitan de Hilda Dresen kiun li muzikigis omaĝe al lia amiko Wandemberg kaj kiun li rekantis omaĝe al la patrintago ĉijare. Do ne cedu ni por ke la paco alvenu, nur kredu. Kaj por havigi pacon disdonu ni pacon.

Bonan legadon kaj Pacon al ni ĉiam!

## AGENDO 2005

### Septembro

11-an – I Marŝado por la Paco - "Paz pela Paz"
Okazaĵo Fortaleze por la paco kaj la senarmigo

Ĝis la 15-a - Reta surskribo-periodo por la Kurso de Instrumenta Esperanto (Curso de Esperanto Instrumental) ĉe UNIFOR
Pli da informoj: www.unifor.br

20-an – Komenco de la Kurso de Instrumenta Esperanto ĉe UNIFOR

### Oktobro

15-an – Ago Tago

Por pli da informoj, bv kontaktu nin per la retpoŝtadreso:

mondcivitano-ce@yahoo.com.br

aŭ per la poŝtelefonnumero: (55 85) 99513955.

**Retpoŝtadreso de CEA: cearao@gmail.com**

La vizito de Sanoza

**NIA ĈINA AMIKINO**



你 好 Saluton
Ni hǎo


# La vizito de Sanoza




En julio vizitis nin la ĉina esperantistino Sanoza, kiu restis ĉe ni kvar tagoj. Ŝi venis al Brazilo pro amikeca kontakto kun la bieno “Bona Espero”, kie ŝi loĝis preskaŭ tri monatojn kaj post tio ŝi vojaĝis al kelkaj nordorientaj urboj kiel: Salvadoro, Macejoo, Recifo, Natalo kaj Fortalezo. Ŝi ankaŭ partoprenis la E-Brazilan Kongreson en Porto Alegre kaj povis koni iomete la brazilan e-movadon.


Certe por ĉiuj ni kiuj konis Sanoza-n estis granda ĝojo, ĉar ŝi vere estas tre amuza virino. Krom la sperto uzi E-lingvon, oni vivis neforgeseblajn momentojn kaj ni multe lernis.




Estis tre interesa ekzemple la promenado al “Dragão do Mar”, kie ni vizitis la regionan kulturan muzeon; imagu klarigi al ŝi pri kio temas kelkaj aferoj kaj aliaj momentoj estis la bona etoso dum la tagmanĝo/ vespermanĝo, kiam ŝi kuiris por ni kelkajn ĉinajn manĝaĵojn...

Por mi la graveco de tia sperto estas ke Ĉinio ne plu signifas nur la plej popola lando de la tero. Hodiaŭ ĝi estas la lando de mia amikino Sanoza. Pro tio ĝi interesas pli al mi. Iamaniere tiu sonoras plej forte al mia koro. Estas nova signifo, ĝuste pro tio mi pensas ke la interŝanĝo kun eksterlandaj e-istoj estas bonega oportuno por la lernado ĉar la informoj kiuj alvenos al ni memorigos min pri ili, pri la geamikoj kaj oni neniam plu ilin forgesos.




Iraneide de Oliveira Lopes

* La ĉinaj manskribitaj frazoj instruis Sanoza al la gecearaanoj.

# Kunsido de reprezentantoj de nordorientaj E-Asocioj

Dato: 21a de julio 2005
Horo: je la 14a gxis 16a horo
Loko: Cxambro I. G. Braga, enkadre de la 40a BKE
Kunordigo: Wandemberg Ribeiro Morais (CE), regiona delegito
Partoprenis: Jason Gonçalves de Lima kaj Ivaldo Alves de Souza (RN), Advalk Paulo Ferreira (PE), Hilbernon Almeida e Maurício (CE), Elisia Martins de Oliveira (BA)

Konkludoj:

• Diskutlisto "Nordorianta_Brazilo" estu uzata, precipe, por PRAKTIKAJ temoj koncerne al NIA regiono. Komune ni cxiuj prioritatigu tiujn temojn. Mesagxoj estu kiel eble plej mallongaj, precizaj, koncizaj.
Celoj de nia diskut listo estu:
1.internkonatigxo/integrigxo de E-asocioj/Kluboj/Esperantistoj
2.identigo/pridiskuto/prioritatigo de komunaj problemoj/solvoj
3.intersxangxo cele al plivigligxo

Proponoj:

• Dauxre kaj pli amplekse intersxangxi spertojn/apogon.
• Sugesti al E-Asocioj/Kluboj ekpasxi de nun al lauxgrada strukturigxo por uzi E-on en TURISMO. La celo estas estonta gastiga serva-reto por nia regiono. Por tio, cxiu asocio devus profiti sian lokajn kondicxojn, kiel ekzemple traduki retpagxojn pri turismo en sia regiono al E-o, aux stipendii lokan E-istan junulon, kiu sin disponu kursi pri turism-gvidado.
• Atente elprofiti la novajn proponojn de BEL-Estraro cele al antauxvidita kunkresko de BEM.
• Tuja engagxigxo en la UEA-Kompanjo "Por pli vasta E-Komunumo". Tio signifos seninterrompan havigo-strukturon por divastigo, instruado kaj utiligado de E-Komunumo en la regiono.

Informoj:

• Informis reprezentantoj de Natal, ke ili sukcesis pretigi E-Eskpoziciojn uzante diversajn DISVASTIG-MATERIALOJN, inter ili 5 paneloj (1,5m longaj, belaspektaj, modernaj). Tiu materialo baldaux estos je dispono de la tuta regiono.
• Informis reprezentantoj de Fortaleza pri ilia decido inviti 43an BRAZILAN KONGRESON al Fortaleza en 2008. Ili do sugestis al cxiuj uzi la eventon, kiel perilon por plivigligxo de E-o en nia regiono, cele sekve al okazigo de grandioza evento kun centoj da partoprenantoj el nordoriento.
• Informis reprezentanto de Recife, ke en la biblioteko de Pernambuka E-Asocio multaj tre bonkvalitaj E-libroj restas sub dauxra minaco de malbona konservado.
• Sin disponis reprezentantino de Salvador kunvoki aliajn aktivulojn de sia sxtato ekpartopreni la Nordorienta-Brazilan diskutliston kaj engagxigxi je regiona agado.

Hilbernon Almeida Filho
Porto Alegre, Julio 2005



# Neforgeseblaj Emocioj



Kongresi estas vivi. La periodo inter kongresoj estas instiga tempo al la vivo. De 1995, kiam mi ekkomencis inviti niajn klubanojn al karavane partopreni BKE-ojn, neniam plu ni ĉesis senti la bonajn aŭgurojn kiuj plene kaj efike nutras nian komunan ekzistadon. Bonetose tutjare ni planas kaj revas… revas kaj planas… kaj la rezulto… jen ke rezulte ni spertas la plej buntajn momentojn je niaj vivoj vojaĝante al la kerno de niaj memoj kaj revenante pli fortigitaj survoje al la estonto kaj la estonto alproksimiĝas… sekvantjare nova evento nacia alvokas nin daŭre labori.



Ĉijare jen ni dektriope ne tre taŭge vestitaj, aviadile (neaŭtobuse kiel kutime), kaj suferante ne elteneblajn 2-4° en tiu nepriskribebla Sud-Riogrando.

Mirinde! Ne malpli ol tio! Varmega!!! akceptado. Ege taŭga kongresejo, eĉ luksa. Riĉa programaro kun viglaj, fruktoriĉaj diskutoj, belegaj kaj variaj artaĵoj. Laŭ nia takso preskaŭ perfekta eldono de la nacia evento (se ne konsideri la malvarmon!)

Ni revenis al Fortalezo plenaj je ideoj realigotaj, planoj, revoj kaj la plezuriga tasko realigi ĉe ni la 43-an en 2008. En la aviadilo, strikte esperantlingve, ni ekskizis nian planadon kaj unu el la plej fiklaj eroj estas ke ni kalkulas je vi ĉiuj kiel kongresontoj en la lando kiu laŭŝajne brilis en 2002 pro la 82-a UK kaj deziregas resperti neforgeseblajn emociojn.



**Verkita de Wandemberg Morais – Prezidento de CEA (Cearaa Esperanto Asocio)**

**Data: Tue, 02 Aug 2005 19:07:57 -0300**
**De: Pedro Cavalheiro <p.cavalheiro@globo.com>**
**Assunto: Re: Hejmpagxo de Cearaa Esperanto-Asocio**

**Parabéns a todos que trabalharam pela realização do site da CEA!**
**Ações como essa me fazem ter a mais profunda certeza que**

**O Esperanto não será: ele Ceará!**

**Com orgulho,**
**Pedro Cavalheiro**
**Presidente da Liga Brasileira de Esperanto.**

**hilbernon skribis:**

**Geamikoj, saluton!**

**Mi invitas vin viziti la novan hejmpagxon de Cearaa E-Asocio:**

**http://www.esperantoceara.org.br/**

**Kaj legi la duan eldonon de Mondcivitano, nia malgranda elektronika periodajxo (baldaux ankaux surpapere):**

**http://www.esperantoceara.org.br/arquivos/mondcivitano2005-2.pdf**

**Dankon kaj gxis!**


**Hilbernon**
**Fortaleza-Ceará**

# Muziko


## NE CEDU

**Poemo: Hilda Dresen**
**Muziko: Tarcísio Lima**

Se la sufer' multivizaĝe grimazas,
La malespero vin kapti minacas,
restu en statu atenda, ne cedu,
certe troviĝos eliro, nur kredu !
Eble penseto savanta subite,
kvazaŭ hazarde kaj neatendite
en la anim' turmentita ekĝermos.
la malesperon radike ekstermos.
Kredu: nenio ja daŭras eterne,
Sangas kaj floras la koro alterne.



# Ludoj



## VORTENIGMO*

La 91-a Universala Kongreso de Esperanto okazos la venonta jaro en Italio. Ĝenerale la UKE honoras per salonomaĝo elstarajn esperantistojn kaj instituciojn. Ĉu vi konas kelkajn el la omaĝitaj?
Provu pere de la gvidfrazoj malkrovi iliajn nomojn kaj koni iomete pri ilia historio.


| | | | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| D | O | M | I | N | G | U | E | S | H | G | R | Y | A |
| Q | H | X | C | A | V | C | I | H | A | F | O | Z | R |
| E | K | N | O | E | D | T | X | O | R | B | C | A | L |
| Z | A | M | E | N | H | O | F | C | A | U | H | L | N |
| A | L | H | O | D | L | E | R | E | B | R | A | G | A |
| S | O | A | L | M | A | D | A | K | A | V | H | X | C |
| X | C | F | T | R | P | I | N | H | G | C | F | T | R |
| T | S | Y | R | G | E | O | C | K | I | M | Y | T | G |
| U | A | N | F | T | N | U | I | V | U | N | N | F | T |
| J | Y | R | W | A | N | Y | N | I | O | N | I | Y | P |
| M | P | R | I | V | A | T | I | L | O | R | E | N | Z |


1. Francisco de Souza A_______________ (1898-1990). Brazilano. Homora membro de UEA. Vaste konata kiel instruanto, informanto kaj organizanto de la brazila movado. Li varbis la subtenon de la fama futbalisto Pelé por E-o, kaj tradukis lian biografion.
2. Ismael Gomes B______________ (1891-1969). Brazilano. Verkisto, vortaristo kaj tradukisto. Li verkis la libron *Veterano* kaj *Curso Esperanto pela Biblia*, kompilis *Grande Diccionário Esperanto-Português* kaj *Diccionário Português-Esperanto* kaj esperantigis *La Evagelio laŭ Spiritismo* de Allan Kardec.
3. Francisko Valdomiro L________________ (1872-1957). Brazilano. Estis poligloto konanta ol 80 lingvojn kaj aŭtoro de entute ĉ 120 verkoj, el kiuj 56 aperis libre. La plej grava traduko lia estas *Bhagavad-gita* el sanskrito.
4. Edmond P________(1889-1962). Sviso Fondinto de Ĝeneva radio, reprezentanto de Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj. Lia verko *Interpopola konduto* grave influis la evoluon de internaciismaj ideoj em la E-movado.
5. Demócrito R___________(1888-1943). Brazilano kaj cearaano. Unu el la pioniroj de la loka movado en Cearao. Ĵurnalisto, politikisto ktp, li fondis en 1928 la ĵurnalo "O Povo".
6. Lazaro Ludoviko Z______________ (1889-1917). La kreinto de Esperanto.

**RESPONDECARO:**
**Ĉefartikolo:** Damiana Britto
**Diagramado :** Ligia Taillade kaj Damiana Britto
**Enretigo:** Wesley Alcoforado kaj Golbery Capistrano
**Revizio:** Hilbernon Almeida kaj Wandemberg Morais

**Ni dankas al:**
Iraneide de Oliveira Lopes
Wandemberg Morais
Hilbernon Almeida Filho
Maurício kaj Sanoza (Fotoj)

**Aperis en la fotoj (maldekstre al dekstre):**
1.Falcao, Neuma kaj Camilo.
2.Damiana, Robson, Iraneide, Golbery kaj Sanoza
3. Vizitantoj, Sanoza, Tarcisio, Wandemberg, kaj Wesley kunside
4. Neuda, Wandemberg, Mauricio, Hilbernon, Leite Jr, Andréa kaj Roberto
5 Neuda, Neuma, Camilo kaj Advalk (el PE)
6. Wandemberg kaj Camilo





**Respondŝlosilon de la KRUC – VORTENIGMO de la 2-a eldono**

| | | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | | | | | | G | E | R | D | A | | |
| 2 | | | | | J | O | E | | | | | |
| 3 | | A | N | K | A | Ŭ | | | | | | |
| 4 | | | | | | B | O | N | V | O | L | E |
| 5 | | A | M | I | K | E | C | O | | | | |
| 6 | | I | N | T | E | R | V | J | U | O | | |
| 7 | | | | T | E | J | O | | | | | |
| 8 | I | T | A | L | I | O | | | | | | |

* La respondŝlosilo estos en la venonta eldono